RAPORTO PRI AGADO de ĈEĤA-ESPERANTO ASOCIO

prezentata dum konferenco de ĈEA 2024 en Česká Třebová

Dum konferenco ĈEA 2023 en Prudká komitato apelis je membroj skribi, kio estas necese fari alie, nove aŭ pli bone. La detala raporto pri kolektitaj demandoj oni aperigis en STARTO 3/2024. En la sama STARTO ankaŭ estis publikigitaj klopodoj de komitato plenumi la proponojn de la „kovilon de ideoj".

Sed komitato ne povas fari ĉion. Ekzemple disvastigi instruadon de la lingvo aŭ pliobligi prezentaĵojn per reto. Por tio ni bezonas kunlaborantojn, membrojn de nia Asocio, kiuj kapablas kaj kuraĝas labori.

Plua tasko el konferenco 2023 en Prudká por komitato estis taksi la Enketon pri la allogeco de eventoj kaj informi la membrojn. Tiu ĉi tasko ne estis plene plenumita. Dum konferenco ne revenis sufiĉe da enketndemandiloj kaj komprebneble estas interesa ankaŭ opinio de homoj, kiuj ne venis kaj regule ne vizitadas niajn aranĝojn. Do ni sendis demandilojn al ĉiuj membroj, sed respondis neniu. Estas malfacile plibonigi ion, se homoj ne diras, kio ĝenas ilin.

Dum la jaro 2024 komitato daŭre traktis pri komuna konferenco kun esperantistoj el Germanio. Finfine komitato proponis komunam renkontiĝon nur en la jaro 2026, ĉar en la jaro 2025 okazos UK en Brno kaj aŭtune nia kongreso, kie ni elektos novan estraron de la Asocio. Do ne estos sufiĉe da tempo dediĉi sin al germanaj esperantistoj.

Membra kunveno en Prudká komisiis komitaton proponi al UEA urbon Brno kiel lokon por 110-a Universala kongreso en la jaro 2025. Ni akiris la celon kaj ni preparis Unuan Bultenon. Ĝian ekzempleron ricevis ĉiu partoprenanto de la konferenco ĈEA 2024. Dum Universala kongreso en Arusô (Tanzanio) ni sukcese prezentis nian landon kaj surloke ni kolektis pli ol cent aliĝilojn. Estis starigita Loka kongresa komitato (LKK), en kiu laboras dek sep membroj.

Evoluo de modernaj teknologioj koncernas ankaŭ nian agadon. Pro tio dum konferenco en Prudká estis decidite esplori la kondiĉojn por okazigo de hibridaj (fizikaj kaj retaj) kunvenoj. Ni provis uzi kelkajn platformojn kaj ni decidis uzi platfomon meet.jit.si. Je tiu ĉi platformo regule kunvenadas komitato kaj LKK-anoj kun Kongresa Fako de UEA. Ni ĝin ankaŭ uzas por retaj kursoj de Esperanto por komencantoj (gvidas Milan Kolka el Brno) kaj por reta BABILADO (vidu informojn je retpaĝaro esperanto.cz).
Por aranĝi hibridajn kunvenojn mankas al ni ankoraŭ spertoj. Ni scipovas nun prizorgi ĉu fizikajn renkontiĝojn ĉu la retajn. Nur mankas al ni provi tiujn hibridajn.

Kun tio estas firme ligita plua postulo el Prudká - trovi eblecon, kiel povu voĉdoni membroj, kiuj fizike ne partoprenos la aranĝon – do starigi hibridan kunvenon.